

Simposio de ILEI 2025

“Artefarita intelekto kaj kulturo”

Dimanĉon la 20-an de Julio 2025, ĉeeste en Beogrado kaj hibride en Zoom, laŭ Serba tempo

14:00-14:10: Alessandra Madella: Enkonduko de la organizanto



14:10-14:50: Shanshan Chen (Shandong University of Arts / Shandong-a Universitato de Artoj): “The Macartney Embassy to China and the Historical Representation through AI-generated Art” (La Ambasadado Macartney al Ĉinio kaj la historia reprezentado pere de arto generita de AI)



14:50-15:20: Wu Jing (Peking University / Pekina Universitato): “The Social Imagination of AI” (La socia imago de AI)

15:20-16:20: Samir Ribić (Universitato de Sarajevo): “AI: Kiel tio funkcias”



16:20-16:50: Viko (Vicente Manzano-Arrondo, Universitato de Seviljo): “La malfacila rilato inter la Homa stulteco kaj la Artefarita intelekto”



16:50-17:00: Paŭzo

17:00-17:30: Du Xin (慶應義塾大学 / Universitato Keio): ポップカルチャーのファンアートに活躍している AI (AI aktiva en fervorula arto pri pop-kulturo)



17:30-18:00: Russell Scott Valentino (Indiana University Bloomington / Indiana Universitato Bloomington): “In-between the In-between: Generative AI and Translation Practice” (Inter la nek unu nek la alia: Generipova AI kaj traduk-praktiko)



18:00-18:30: Alessandra Madella (Zaozhuang-a Universitato): “Artefarita Intelektio en Arto kaj kosmoteknikoj de Yuk Hui” kun respondo de David Depew (University of Iowa / Universitato de Iowa)

18:30-19:00: Diskutado

“The Macartney Embassy to China and the Historical Representation through AI-generated Art” (La Ambasado Macartney al Ĉinio kaj la historia reprezentado pere de arto generita de AI)

The Macartney Embassy to China in 1793 marked a pivotal moment in the history of early modern diplomacy, cross-cultural exchange, and imperial imagination. As the first British mission to the Qing court, it left behind a rich visual and textual archive that shaped Western perceptions of China and revealed the complexities of intercultural negotiation. Today, with the advent of artificial intelligence and generative technologies, artists and historians have new tools to reimagine and reinterpret such historical encounters. This project explores how AI-generated art can be used to visualize, critique, or reconstruct the cultural and political dimensions of the Macartney Embassy. By combining historical records with machine learning techniques, it investigates the potential and limits of AI in representing contested narratives, visual memory, and global encounters of the eighteenth century.

La Ambasado Macartney al Ĉinio en 1793 markis pivotan momenton en la historio de frua moderna diplomatio, trans-kultura interŝanĝo kaj imperia imago. Kiel la unua brita misio al la kortego Qing, ĝi lasis malantaŭ si riĉan vidan kaj tekstan arĥivon, kiu formis la okcidentajn perceptojn pri Ĉinio kaj malkaŝis la kompleksecojn de interkultura negocado. Hodiaŭ, kun la alveno de artefarita intelekto kaj generpovaj teknologioj, artistoj kaj historiistoj havas novajn ilojn por reimagi kaj reinterpreti tiajn historiajn renkontojn. Tiu ĉi projekto esploras kiel arto generita de artefarita intelekto povas esti uzata por vidigi, kritiki aŭ rekonstrui la kulturajn kaj politikajn dimensiojn de la Ambasado Macartney. Kunmetante historiajn registraĵojn kun maŝin-lernaj teknikoj, ĝi esploras la potencialon kaj la limitojn de AI en la reprezentado de kontestataj rakontoj, vidaj memoroj kaj tutmondaj renkontoj de la dek-oka jarcento.

Pri la preleganto:

Shanshan Chen holds a PhD in Art History from the University of Hong Kong and is currently an Assistant Professor of Art History at Shandong University of Arts. She pursued graduate studies in Art History at the University of Iowa and Princeton University. Her research has been supported by prestigious awards, including the Frank Jewett Mather Jr. Memorial Scholarship from Princeton

University and a research grant jointly awarded by the Getty Foundation and the Asia Art Archive in Hong Kong. Dr. Chen is the author of several major publications, including English- and Chinese-language monographs on the Macartney Embassy to China. At Shandong University of Arts, she has established the Research Center for Sino-Western Artistic Exchange and Digital Creative Culture and the Think Tank for the International Communication of Chinese Cultural Heritage, further advancing interdisciplinary and cross-cultural scholarship.

Shanshan Chen doktoriĝis pri Arthistorio ĉe la Universitato de Hongkongo kaj estas nun Vicprofesoro pri Arthistorio ĉe Shandong-a Universitato de Artoj. Ŝi postbakalaŭre studis ĉe la Universitato de Iowa kaj Universitato Princeton. Ŝian esploradon subtenis prestiĝaj premioj, inkluzive de la memoriga stipendio Frank Jewett Mather Jr. de Universitato Princeton kaj esplor-stipendio kune donita de Fondaĵo Getty kaj la Arĥivo pri Azia Arto en Hongkongo. D-ro Chen verkis plurajn gravajn publikaĵojn, inkluzive de angla kaj ĉina monografiaj pri la Ambasado Macartney en Ĉinio. Ĉe Shandong-a Universitato de Artoj, ŝi starigis la Esplorcentron por Ĉin-Okcidenta Art-interŝanĝo kaj Cifereca Krea Kulturo, krom la Pens-fabrikon por la Internacia Komunikado de Ĉina Kultura Heredaĵo, tiel antaŭenigante interdisciplinan kaj trans-kulturan esploradon.

"The Social Imagination of AI" (La social imago de AI)

With Deepseek dashing into public visibility during the long Spring Festival break in China, AI has become the No. 1 topic in mainstream media, social media platforms, as well as small talks in family gatherings and parties of ordinary citizens. The degree and extent to which AI has captured public imagination is unprecedented. In this talk, I want to summarize and describe several typologies of social imaginations of AI in contemporary China, based on initial observations of various channels of mediation. The typologies include techno-nationalism discourses, AI's role in making important, critical decisions, AI's similarity and dissimilarity with individual human beings, and the discussions over AI as the new work force. Social imaginations ultimately influence and shape the way new technologies integrate into social organization and social life, and therefore it is important for us to understand the deep concerns of the citizens over AI as the most important new-age technology.

Ĉar Deepseek abrupte eniris publikan videblecon dum la longa Printemp-festa libertempo en Ĉinio, AI iĝis la plej ofta temo en la ĉefaj amaskomunikiloj, sociaj retejoj kaj babiladoj dum familiaj renkontiĝoj kaj festoj de ordinaraj civitanoj. La grado kaj amplekso, per kiuj AI kaptis la publikan imagon estas senprecedencaj. En mia prelego, mi volas resumi kaj priskribi diversajn tipologiojn de sociaj imagoj de AI en nuntempa Ĉinio, bazante min sur komencaj observadoj de diversaj komunikaj kanaloj. La tipologioj inkluzivas tekno-naciistajn diskursojn, la rolon de AI en la farado de gravaj, kritikaj decidoj, la similon kaj malsimilon de AI kompare kun individuaj homoj kaj la diskutojn pri AI kiel la nova laborforto. Sociaj imagoj finfine influas kaj formas la manieron, en kiu novaj teknologioj integriĝas en la socian organizadon kaj la socian vivon, tial gravas por ni kompreni la profundajn zorgojn de la civitanoj pri AI kiel la plej grava nov-epoka teknologio.

Pri la preleganto:

Dr. Wu Jing is professor of communication at the School of Journalism and Communication at Peking University. She got her Ph.D. in Communication from the Department of Communication Studies, the University of Iowa. Her research areas are critical media and cultural studies, social theories of communication and media technology, social uses of new media, creative industries, visual culture, etc. She published articles both in Chinese and English on topics concerning various aspects of media, culture and society. Her recent research interests focus on social uses, history and social theories of new media technologies, especially visual media and the Internet.

D-ro Wu Jing estas profesoro pri komunikado ĉe la Departamento de Ĵurnalismo kaj Komunikado ĉe Pekina Universitato. Ŝi doktoriĝis pri Komunikado ĉe la Departamento de Komunikaj Studoj de la Universitato de Iowa. Ŝiaj esplorareoj estas kritikaj komunikilaj kaj kulturaj studoj, sociaj teorioj de komunikado kaj komunikila teknologio, sociaj uzoj de novaj komunikiloj, kreaĵoj, industria kulturo, ktp. Ŝi publikigis eseojn en la ĉina kaj en la angla pri temoj koncernantaj plurajn aspektojn de komunikiloj, kulturo kaj socio. Ŝiaj lastatempaj esplor-interesoj fokusiĝas pri sociaj uzoj, historio kaj sociaj teorioj de novaj komunikilaj teknologioj, precipe vidaj komunikiloj kaj la interreto.

“AI: Kiel tio funkcias?”

Dum la evoluo de komputiloj, la koncepto de artefarita intelekto ĉiam ŝajnis io en tuja, tamen malproksima estonteco. Kiel komputilo plenumas intelektajn taskojn, de simplaj aritmetikaj operacioj ĝis hodiaŭaj grand-lingvaj modeloj? Kiel okazas, ke ĉiufoje kiam ni komprenas la bazan funkciajn principon de nova komputila atingo, ni ĉesas admiri ĝin kaj ĉesas nomi ĝin artefarita intelekto? Per persona sperto, ni transiros de konektado de dratoj, tra logikaj cirkvitoj, konstruado de makroprocesoroj, la principoj de ŝako, simbola matematiko, optika teksto-rekono, neŭtralaj retoj, la programo ChatGPT, al cerbaj simuladoj en la malproksima estonteco. La prelego estas ankaŭ subtitulita en Esperanto.

Pri la preleganto:

Profesoro D-ro Samir Ribić (1968) estas plena profesoro ĉe la Fakultato de Elektrotekniko en Sarajevo, instruante la fakojn Operaciumoj, Sistemprogramado kaj Programlingvoj kaj tradukiloj. Li okupiĝis pri komputiko kaj informadiko dum pli ol 40 jaroj, laborante unue kiel programisto kaj teknika direktoro, kaj poste kiel asistanto kaj profesoro ĉe la fakultato. Samir estas doktoro de sciencoj en la kampo de efektivigo de programlingvoj. Li publikigis 26 sciencajn artikolojn, ĉirkaŭ 60 profesiajn artikolojn kaj tri librojn. Li estas membro de la IEEF, la Teknika Komitato por IT-Normigado kaj la Universala Esperanto Asocio.

“La malfacila rilato inter la Homa stulteco kaj la Artefarita intelekto”

Ni komencos la aferon proksimiĝante el la popola kaj literatura aliroj al la stulteco kaj klopodos skizi ĝiajn trajtojn pere de scienca aliro. Post kompreni la enhavon kaj potencon de la koncepto, ni tuŝos kelkajn rilatojn inter ĝi kaj AI.

Pri la preleganto:

Viko (Vicente Manzano-Arrondo) estas profesoro pri esplorado de la homa konduto en la Universitato de Sevilo, Hispanujo, kaj respondeculo pri Sciencigo en la Universitato de la Espero en Baraka, DR Kongo. Li kunrealigas la entreprenon Civincia, kies oficialaj du lingvoj estas la hispana kaj Esperanto. Lia esplorfako estas la subpremado kaj ĝiaj branĉoj. Unu el tiuj branĉoj estas la scienca esploro de la stulteco.

ポップカルチャーのファンアートに活躍している AI (AI aktiva en fervorula arto pri pop-kulturo)

人工知能（AI）、特に生成 AI がポップカルチャーの二次創作小説や動画などのファンアートに活用される頻度が高くなっている。今回の発表では、実演しながら、生成 AI がどのようにファンアートに使われているのか、その特徴と問題点についてご紹介したいと思います。

Artefarita intelekto, precipe generipova AI, estas uzata pli kaj pli ofte por fervorula arto, kiel derivitaj romanoj kaj videoj pri pop-kulturo. En mia prelego, mi montros la ecojn kaj la problemojn de la uzado de generipova AI por fervorula arto.

Pri la preleganto:

Du Xin magistriĝis pri Japanaj Kulturaj Studoj ĉe Pekina Universitato (Ĉinio) kaj pri Soci-psikologio ĉe Keio-Universitato (Japanio), kie ŝi ankaŭ doktoriĝis pri Sociologio. Ŝiaj ĉefaj esplorkampoj estas Internaciaj komparaj studoj pri socia konscio kaj junulara sociologio (la perspektivo de la junaj generacioj pri vivo kaj laboro, popkulturo). Ŝia disertacio iĝis la (japanlingva) libro *Internacia komparo de junulara laborkonscio en moderna socio: Kvalita esploro fokusiĝanta pri altedukitaj homoj en Japanio kaj Ĉinio*. Ŝi havas la japanan altnivelan kvalifikon de “Profesia Socia Esploristo” kaj estis estrarano de la Ĉina Esplora Societo pri Sociaj Sciencoj, la plej granda kaj longtempa organizo de ĉinaj universitatanoj loĝantaj en Japanio. Ŝi laboras kiel ĵurnalisto kaj instruas ĉe Keio-Universitato.

“In-between the In-between: Generative AI and Translation Practice” (Inter la du vizaĝoj de Jano: Generipova AI kaj traduk-praktiko)

Much like the story of Ivan Turgenev’s supposed characterization of his narratives as *romany* when they were well received but *povesti* when they were not, translators have been known to shift the theoretical ground underfoot when faced with criticism or approbation—when a reader liked their work, they might hold forth about the creative difficulties of the text; when not, it was often “just what the author wrote.” In the commercial and critical realms, moreover, while work-for-hire translations tend to be consumed without reference to, and sometimes without awareness of, their translated nature, the translation of a text, such as highly formal poem, which is perceived as difficult if not “impossible” to translate is often celebrated as a tour-de-force. In the latter case, translation is considered a creative act par excellence, in

the former so mechanical as to not even be worth mentioning. This in-between nature of translation—perceived as sometimes purely mechanical, other times highly creative—tends to put its relation to generative AI into its own category, especially when the approach shifts, depending, as in the Turgenev analogy, on the perceived reception of a text. In this presentation, I will explore this and other questions that generative AI colors in its own particular manner, especially where accuracy and creativity rest on unstable ground.

Tre simile al la onidiro pri kiel Ivan Turgenev karakterizis siajn rakontojn kiel *romany*, kiam la publiko bonvenigis ilin, sed nur kiel *povesti*, kiam ili fiaskis, tradukistoj ja emas ŝanĝi la teorian grundon sub la piedoj laŭ la kritiko aŭ aprobo, kiun ili ricevas—kiam leganto ŝatas ilian verkon, ili abunde substrekas la kreaĵn malfacilaĵojn de la teksto; kiam okazas la malo, ofte la tuto iĝas “nur tio, kion la aŭtoro verkis.” Krome, en la komercaj kaj kritikaj kampoj, kontraste al la tendenco konsumi dungitajn tradukojn sendepende de tia ilia eco aŭ eĉ sen konscii pri ĝi, oni ofte celebras kiel elstaran atingon la tradukon de teksto kiel tre formala poemo, kies traduko aperas malfacila aŭ “malebla.” En la lasta kazo, tradukado estas konsiderata senkompare kreiva akto, dum en la unua ĝi ŝajnas eĉ ne menciinda pro sia troa meĥanikeco. Tiu Jana eco de tradukado—sentita kelkfoje nur meĥanike kaj aliffoje tre kreive—emas meti sian rilaton kun generipova AI en sian propran kategorion, precipe kiam la aliro ŝanĝiĝas, kiel en la analogio de Turgeneve, laŭ la perceptata bonvenigo de la teksto fare de la publiko. En mia prelego, mi esploros tiun ĉi demandon kaj aliajn, kiujn generipova AI kolorigas en sia aparta maniero, precipe kiam akurateco kaj kreiveco staras sur nestabila grundo.

Pri la preleganto:

Russell Scott Valentino is a professor in the department of Slavic and East European Languages and Cultures and the Department of Comparative Literature at Indiana University Bloomington. His work has been published by the *NY Times*, Reaktion Books, *The Harvard Review*, Yale University Press, and a dozen other literary magazines and book publishers; and supported by the NEH, the NEA, PEN American, and the U.S. Department of State and Education. Former Editor-in-Chief at the Iowa Review and former President of the American Literary Translators Association (ALTA), Valentino served on the 2022 jury for the National Book Awards. He is the founder and publisher of Autumn Hill Books and blogs at russellv.com. His translation of Miljenko Jergović’s family saga *Kin* (Archipelago Books, 2021) received the 2023 Best Prose Translation award from the American Association of Teachers of Slavic and East European Languages. His translation (with Miriam Shrager and Sibelan Forrester) of Vladimir Propp’s *Historical Roots of the Wondertale* is due out from Indiana University Press in September, 2025. He is currently a Fulbright Scholar affiliated with the University of Zadar.

Russell Scott Valentino estas profesoro en la Departemento de Slavaj kaj Orient-Eŭropaj Lingvoj kaj Kulturoj kaj en la Departemento de Komparaj Literaturoj ĉe Indiana Universitato Bloomington. Liaj verkoj estis publikitaj de *NY Times*, Reaktion Books, *The Harvard Review*, Yale University Press, kaj po dekduo da aliaj literaturaj revuoj kaj eldonistoj; ili ricevis subtenon de NEH, NEA, PEN American kaj la Usona Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj kaj Edukado. Iama ĉefredaktoro de Iowa Review kaj iama Prezidanto de la Usona Asocio de Literaturaj Tradukistoj (ALTA), Valentino servis kiel ĵuriano por la 2022-a eldono de National Book Awards (Naciaj Libro-premioj). Li estas la fondinto kaj la eldonisto de

Autumn Hill Books kaj blogas ĉe russelly.com. Lia traduko *Kin* (Archipelago Books, 2021) de la familia sagao de Miljenko Jergović ricevis la 2023-an premion por la Plej Elstara Proza Traduko de la Usona Asocio de Instruistoj de Slavaj kaj Orient-Eŭropaj Lingvoj. Lia traduko (kun Miriam Shrager kaj Sibelan Forrester) de *Historical Roots of the Wondertale* de Vladimir Propp aperos en Septembro 2025 ĉe Indiana University Press. Li estas nuntempe la ricevanto de stipendio Fulbright por universitataj agadoj ligitaj al la Universitato de Zadar.

Artefarita Inteljekto en Arto kaj kosmoteknikoj de Yuk Hui (Artificial Intelligence in Art and Cosmotechnics by Yuk Hui)

Yuk Hui estas filozofo, kiu instruas ĉe la City University de Hong Kong. Li famas pro sia libro *The Question Concerning Technology in China* (*La demando koncerne teknologion en Ĉinio*, 2016), kie li argumentas, ke ni devus aldoni al la pivota ese de Martin Heidegger “Die Frage nach der Technik” (1953) la remalkovron kaj la interrilaton de diversaj kosmoteknikoj. Tiuj kolektivaj estetikaj spertoj kaj pensoj pri teknologio de malsamaj epokoj kaj lokoj povas efektive helpi nin rezisti kontraŭ la forgeso de la Esto kaŭzita de la universaligo de okcidenta teknologio kiel *Gestell*, aŭ “enframigo”, kiu reduktas homojn, ne-homojn kaj naturon al ekspluatebla, ĉiam-preta rezervaĵo. En sia pli freŝdata libro *Art and Cosmotechnics* (Arto kaj kosmoteknikoj, 2021), Hui pritraktas pli profunde la problemon de estetiko en ĝiaj rilatoj kun teknologio. Mi argumentas, ke la demandoj, kiujn li faras en sia verko pri la rilato inter arto, teknologio kaj filozofio, provizas al ni interesajn pensojn pri la ebla disvolvo de malpli limigita AI. Artefarita intelekto iĝis granda produktanto de estetikaj objektoj, eĉ vendataj ĉe grandaj aŭkcioj. Sed, preter la ekscitiĝo de la merkato kaj la blinda konkurado de teknologiaj progresoj, kiel artefarita intelekto povas vastigi la eblojn de arto kaj kiel arto povas reciproke subteni la progreson de teknologio en manieroj ankoraŭ ne antaŭvideblaj? Kiel arto kaj moderna teknologio povas helpi nin pensi novan komencon por filozofio post la fino de Okcidenta metafiziko laŭ Heidegger aŭ post la postmoderno, ankoraŭ tro bazita sur Okcidenta moderneco?

Yuk Hui is a philosopher teaching at the City University of Hong Kong, famous for his book *The Question Concerning Technology in China* (2016), where he argues that the pivotal 1953 essay by Martin Heidegger “Die Frage nach der Technik” had to be supplemented by the rediscovery and articulation of different cosmotechnics. These collective aesthetic experiences and thoughts about technology of different epochs and localities can help us resist the forgetting of Being brought about by the universalization of Western technology as *Gestell*, or “enframing”, which reduces humans, non-humans and nature to exploitable standing-reserve. In this more recent book, *Art and Cosmotechnics* (2021), Hui deals more in depth with the question of aesthetics in its relation with technology. I argue that the questions he asks concerning the relation between art, technology, and philosophy in this work brings us interesting insights on the possible development of a less restricted AI. Artificial intelligence has become a major producer of aesthetic objects, even sold at major auction houses. However, beyond the thrill of the market and of the blinding competition of technological advancements, how can artificial intelligence enlarge the possibilities of art and how can art reciprocally help the development of technology in ways

yet unforeseen? How can art and modern technology help us think a new beginning for philosophy after Heidegger's end of Western metaphysics or after the postmodern, still too based on Western modernity?

Pri la preleganto:

Alessandra Madella studis Japanan Literaturon ĉe la Universitato Ca' Foscari de Venecio kaj la Universitato de Tokio. Ŝi doktoriĝis pri Komunikaj Studoj (Retoriko) ĉe la Universitato de Iowa en Usono kun disertacio pri la retoriko de teknologio en la franca-japana filmo *Hiroshima mon amour* (<https://ir.uiowa.edu/etd/1245/>). Ŝi instruis Mondan Kinhistorion kaj Esperanton ĉe la Artkolegio de Kunming kaj estas nun profesorino de la Esperanta fako ĉe Zaozhuang-a Universitato en Ĉinio. Ŝi estas la nuna vic-prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), aŭtoris la libron *Esperanto: Facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj* (Edistudio, 2023, ankaŭ en la itala kaj en la kroata) kaj redaktis la *Aktojn de la Simpozio de ILEI 2022-23* (Edistudio, 2024).

Pri la respondanto:



David J. Depew Emeritus Professor at the University of Iowa. He has taught history of philosophy and history of rhetoric. His scholarship focuses on the history, philosophy, and rhetoric around evolutionary biology. He is co-author of three books on the subject, most recently, *Darwinism, Democracy and Race: American Anthropology and Evolutionary Biology in the Twentieth Century*, with John P. Jackson (Routledge, 2017).

David J. Depew, Emerita Profesoro ĉe la Universitato de Iowa. Li instruis historion de filozofio kaj historion de retoriko. Lia esplorado fokusiĝas pri historio, filozofio kaj retoriko pri evoluisma biologio. Li kunverkis tri librojn pri la temo, plej freŝe *Darwinism, Democracy and Race: American Anthropology and Evolutionary Biology in the Twentieth Century* (Darvinismo, demokracio kaj raso: Usona antropologio kaj evoluisma biologio en la dudeka jarcento) kun John P. Jackson (Routledge, 2017).